



ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

Julie Šupichová: O nás a pro nás

Uvěřejňujeme s radostí tento článek zasloužilé spolupracovnice, i když ještě nejsme se stavem hnutí tak spokojeni.

Řekněme si upřímně, že úspěchy v našem hnutí, jichž jsme dosáhli v osvobozené republice, nejsou malé. Dokonce v některých složkách jsou velmi příznivé, což ovšem neznámá, že jsme již dosáhli splnění všech svých přání a že můžeme ustát v práci. Právě naopak.

Jen se podívejme na pořady ve vysílání esperantem v zahraničních stanicích — my jsme již dávno na prvním místě! Obětavou prací naší Rozhlasové komise a jejich spolupracovníků jsme předstihli celý svět. A není to jen Praha, která tak hojně používá esperanta v rozhlase, ale druží se k ní čestně Ostrava, dále Hradec Králové a chystá se zapojit — k naší nemalé radosti — i Brno!

Základem hnutí všude, tedy i u nás, je dobrá organizace. Práce našeho Svazu je veliká, obsáhlá a rozmanitá. Bohužel, menší je počet pohotových pomocníků, kteří by byli k ruce hlavním činovníkům, kteří vedou ten či onen obor. To je však údělem všech spolků, že hlavní břemeno nesou na svých bedrech namnoze neznámí jednotlivci. Naše ústředí však doplňuje síť krajských důvěrníků, kteří se zapojili k pevné výstavbě a konají tak platné služby celku. Důkazem jsou pracovní schůze a konference mimopražských samiček, kteří plně pochopili svůj úkol.

Kromě místních velmi četných organizací, namnoze v úplně nových střediskách, se zvláštním zřetelem na dělníky, pracuje plzeňská společnost »Kulturo« a mezi katolíky »Svaz katolických esperantistů v Československu«.

Naše nejstarší ohniska esperantské činnosti jsou oba kluby, a to brněnský (založený 1901) a pražský (1902).

Že i bratři Slováci zahájili a udržují jednotnou práci, dokázal první jejich sjezd, pořádaný 1947 v Turčanském Sv. Martině. Jejich úspěchy, zejména na školské roli, jsou významné.

V zemích Čech a Moravy jsme dosud nepronikli do škol, až na nepatrné výjimky. Radostnou skutečností je lektorát esperanta na Vysoké škole speciálních nauk v Praze a jeho

připravované vysokoškolské extenze v městech mimo Prahu.

Velikým úspěchům se těší Letní esperantská škola v Doksách, navštěvovaná též zahraničními esperantisty. Je to opět nadšení a neúnavná práce několika jedinců, kteří to dokázali.

Jedině naše novinářská služba — tak nezištně nabízená redakcím listů — naráží stále na nepochopení. Vysvětlujeme si to nedostatkem místa, ačkoliv ve dnech, kdy se stále volá po mezinárodním sblížení a sbratření národů, mohla by esperantu, ideálnímu dorozumivacímu prostředku, být věnována aspoň část toho, co zaujme v našem tisku denně sport — ?

Přece však jeden potěšitelný úkaz: mimopražské deníky a týdeníky si všimají esperanta, dopřávají místa pro zprávy o něm a bohaté kroniky. Některé ty esperantské hlídky jsou skutečně vzornou ukázkou, jak propagovat tiskem (na př. Stráž severu v Liberci a j.).

Naš oficiální orgán »Esperantista« snaží se získat každého esperantistu — nový v něm najde mimo jiné též jazyková cvičení k nutnému zdokonalení v jazyce, laik se přesvědčuje o rozmachu a vzrůstu hnutí u nás i v cizině. Vedle »Esperantisty«, který nám všem dává tolik krásné četby a radosti, vycházejí — některé velmi zajímavé — též věstníky krajských organizací. — V Trenčíně vychází bratrský »Esperantisto Slováka«.

Literární činnost československých esperantistů je též hodna zmínky. S radostí jsme přivítali obnovení našeho knihkupectví (každý nechtě ho používá při nákupu esperantských publikací). Těžko bychom mezi propagačními a informativními pomůckami a letáky — máme přece možnost číst tisky celého světa — našli tak znamenitou a potřebnou věc, jakou je »Pojítka«, které napsal náš zaslužilý pionýr H. K. Bouška. Však jeho časté nové vydání nejlépe dokazuje, čím je a může být.

Problém učebních pomůcek, tak náležitý, byl velmi brzo řešen hned po druhé válce u nás. Dosud od r. 1945 vyšly dvě učebnice pro samouky a kursy, jedna učebnice pro mládež, jedna kniha konverzační, jedna učebnice pro Slováky a konečně v Orbisu životopis dr. Zamenhofa. Malý, ale nejvyš potřebný Hromadův

Slovníček je jen předchůdcem dvou velkých slovníků, na které zejména čekají naši nováčci.

Nelze tu nevzpomenouti našich esperantských básníků — jejichž původní i přeložená poesie tak mistrně zdobí zatím naše i zahraniční esperantské listy. Všem nám jsou dobře známá jména Lukáš — dr. Pumpr — Pič. Který esperantský list se může pochlubit takovými ukázkami jako my?

Z uznání a ocenění veřejnosti nás těší zejména zájem ÚRO, která brzo po revoluci nám podala pomocnou ruku — dále bratrstvo sokolské, které používá esperanta ve své publikační činnosti. S radostí se účastníme na podpisové akci, kterou vede naše mezinárodní ústředí v Lodyně pro organizaci Spojených národů. Jsme — podle posledního záznamu — na 3. místě.

Učíme esperantsky v kursech, tu a tam i na školách, soukromě — podle učebnic anebo své individuální metody — používáme známé Csehovy metody. Učíme i s pomocí písemných kursů — pokud je mi známo, vyšly takové v Praze, Hradci Králové a ve Zlíně. Naše zkušební komise nám dvakrát ročně potvrzuje znalost a způsobilost nových stoupenců a učitelů esperanta.

Jedno je jisté — veřejnost o nás ví a všímá si nás. Za hranicemi pomohlo esperanto svítit těm, kteří jsou mylně anebo nedostatečně o nás informováni — o naší republice, její práci a

snažení. Přednášeli (a přednášejí) v cizině odb. učitel J. Vitek, prof. P. Jan Filip, ředitelka M. Havránková a O. Ginz.

Snad jen ještě více potřebujeme proniknout do řad mládeže. To je úkol, který nás čeká. Má-li naše hnutí jít stále tak úspěšně kupředu, musíme si určit příčiny, které nás dělí od konečného cíle. K velkým věcem dojdeme jen přes malé. Proto si musíme všimnout zdánlivě bezvýznamných maličkostí, na příklad takových, kterými se provinujeme proti jazyku, jehož stoupenec se nazýváme — často s fanatickou téměř houževnatostí.

A protože právě důkladná znalost jazyka a jeho upotřebení v slově a písmě je podmínkou naší zdárné činnosti, snažme se v něm co nejvíce zdokonalit.

Máme a měli jsme nejlepší pracovníky v minulosti — kéž najdou hodně dobrých a oddaných následovníků! Čítáme a dovidáme se, že i naši první průkopníci — Fr. V. Lorenz v Brazílii, Th. R. Čejka a J. Krumpholtz na Moravě — jsou dosud činní v hnutí a mnozí z nás orají esperantskou brázdou již 40 a více let. Tito pionýři pracovali za svízelných podmínek. Mají ti noví, mladí a neméně nadšení esperantisté ustati na dráze, která je mnohem snadnější a příjemnější? Věřím, že půjdou dál v radostném tušení, že se blíží a že jistě přijde uskutečnění vznešeného ideálu Zamenhofova!

(17. XI. 1947.)

Finita diskuto

(Vidu pĝ. 63, 92, 102!)

S-o prof. dr. W. J. A. Manders denove asertas kaj ni sciigas al niaj legantoj:

1. Li nenie en sia nederlanda verko »Vijf Kunsttalen« proponas reformojn de Esperanto, kontraŭe li skribas en la antaŭparolo laŭvorte: »Estos espereble superflue certigi, ke mi atendas nian utilon de antaŭtempaj reformoj. Kun Zamenhof mi opinias, ke pri reformoj ne povas esti penso, dum ne ekzistas instanco, kiu posedas sufiĉan aŭtoritatecon por ĝenerale enkonduki la definitivan formon de la lingvo artefarita.« En la verko mem li aldonas, ke estas simpla antaŭjuĝo kondamni Esperanton pro tio, ke ĝi havas vortojn kiel »edzo« (el: Prinz-essin), »fraŭlo«, »lerta« (el: alerte) k. s.; se iuj pro tiaj senvaloraj motivoj rifuzas Esperanton kaj akceptas alian sistemon, povus okazi treeĝe be-

daŭrinda samtempa funkciado de du lingvoj, ĉar la oriento kaj la tuta laboristaro restus esperantista.

2. La lasta duono de la artikolo de s-o Jung ne redonas la ideojn de s-o Manders, sed de s-o T. J. mem kaj s-o M. juĝas, ke ankaŭ la personaj ideoj de s-o Jung ne estas riproĉindaj, ĉar s-o T. J. tie deziras: »Neniam kaj neniel ni forĝesu la ĉefan aksiomon, kun kiu la tuta afero de internacia lingvo staras aŭ falas: la unuecon. Pluraj lingvoj internaciaj — nenia lingvo internacia!«

3. La verko de s-o M. ne havas tendencon, kiun ni kondamnis (tendencon, ne libron! Vidu pĝ. 76!) post kiam ni legis la raporton de s-o Jung pri la libro de s-o Manders.

Ni kredas, ke la afero estas nun tute klara (tre klara!), tial: punkto! HKB.

Edvard Valenta: Malgranda punkto sur nazo

La viro, kies fatalo estis malgranda punkto sur nazo, ne posedis kompreneble la nomon Duval. Ĉar ĝi ne estas rakontaĵo, sed veraĵo: tial preferu Duval, Duval. Pri la ceteraj du viroj ne ekzistas bezono prisilenti ion ajn, ili ja estis simplaj amerikanoj, neornamitaj per okazintaĵo, kiu meritis rakontadon: Mr Kinsey estis kulturalisto de arbofruktoj el Glendory, kaj Mr Wood estis vojaĝanta agento kun glaciŝrankoj, do el

nenie, simple el vagonaro. Amerikanoj amerikanaĵoj, tio estas kun cigaredo Chesterfield, trikita tolaĵo, maĉgumo, elkora babilemo kaj kutimo neniam tiri fenestrajn kurtenetojn en pullmanlavejeto antaŭ necesejo tiel, ke en ĉiuj stacioj, kiujn ni trapasas, oni el kajo vidu harohavajn brustojn malantaŭ la vagona vitro.

La tria, sinjoro Duval, estis precize dirite monsieur; sed ni estas en Ameriko, do Mr. Tiu

Mr Duval havis kun ni komunan sole babilemon; sed tio al li estas pardonata pro lia efektive nekutima okazintaĵo, malgranda punkto sur nazo. Eĉ mi ne silentus estante en tiu ĉi haŭto; eĉ mi malfermadus mian internon al hazardaj kunvojaĝantoj.

Ni sidis en restoracia vagono ĉe vespermanĝo, ni kvar solaj. Kunigis nin parte interparolado pri blizardo en Nova Meksikio (kiu kulpis, ke mi frostis en stacidomo Lamy dum ok horoj atendante tiun ĉi vagonaron) kaj parte aŭtentika Colorado-celerio, tiuj gracilaj folieroj kuŝantaj inter glaciaj kubetoj. Ho, vi folieroj de aŭtentika Colorado-celerio, kiuj mem valoras navigadon trans Atlantika oceano!

Mr Duval donis konfeson tre rapide: tio koncernas nek pampelmojn nek liveron de glaciŝrankoj al Teksaso, objektoj, pri kiuj, sinjoroj Kinsey kaj Wood, ne estu parolate tie ĉi! Ĝi koncernas la sesan premion de la fotografia Curtis-konkurso el la jaro 1936; kio signifas, ke pri tiu okazintaĵo oni devas komenci en Eŭropo, en Lyon, kie mortis patro de akademia artpentristo Duval, prokuristo, kaj heredigis lin sepdek kvin mil frankojn, nu, ni diru precize, sepdek tri. Li do decidigis por studvojaĝo Amerikon.

— Vi, franca artpentristo, kaj studvojaĝon en Amerikon?

Grasa serpeto de Duval-nazo ekbalancis embarase super teleretoj. Li ja ne ŝajnis gravajn sekretojn. Ĝi estis komence efektive konceptata kiel studvojaĝo. Sed ĉio renversigis jam en Washington.

— Mi envenis al Brentano por Historio de amerika pentroarto.

Li envenis al Brentano kaj komizo altrudis al li ankoraŭ Fotografian Curtis-jarlibron.

— Fotografajoj, simple tiaj, kolekto de fotografajoj, kiuj venis por tiu konkurso. Kaj ekde tiu tempo mi flugadas super Ameriko.

Li veturis el Washington Clevelandon, returne en New Yorkon, poste avione trans la tuta kontinento en San Franciskon, returne en Omahan, el Omaha al Boulder-Dam kaj el tie al Parker-Dam.

— Homidoj, mi satflugadis trans ĉiuj diablolandoj.

Nur sur dezerto apud Parker-Dam li trovis aŭtoron de la fotografiaĵo, kiu ricevis la sesan premion; li estis amatoro, krome inĝeniero por akvokonstruaĵoj.

— Li nomiĝas Charles W. Nance. Mi klarigis al li, ke mi serĉas por akiro lian modelon. Mi devas vidi tiun virinon, kiun Mr Nance fotografis kaj pro kiu li estas ricevinta la sesan premion.

— Kaj ŝi estis Mrs Nance, aldonis Duval. Tiu surprizega mieno, tiu ĉiela vizaĝo, fotografiaĵo, pro kiu senordigis liaj sensoj en Washington, kiu devigis lin serĉi tra Ameriko aŭtoron kaj originalon, estis Mrs Nance.

— Je kapro! frapegis Mr Kinsey per pugno sur tablon. — Mi ankaŭ iam iun inon — ankaŭ fenomenon —

Sed Mr Duval ekrigardis tre severe al Mr

Kinsey. Kiom, Mr Kinsey volus eble kompari an sian malnovan okazintaĵon — pardonu!

— Nu jes, nu jes, retirigadis pentofarante Mr Kinsey. En lia kazo ne estis ja similaj komplikajoj, li ne krozadis trans Ameriko por trovi edzon de serĉata virino. Efektivo pikanta. Kaj Mr Nance — kion diris Mr Nance, ho, he?

— Ne, ne, parolas Mr Duval, tio eĉ ne estis komplikajo. Mr Nance donis simple al sinjoro Duval hodiaŭan adreson de Mrs Nance, Boston, Massachusetts. Granda honoro por mi, mi bedaŭras, ke ŝi ne estas tie ĉi, estis li dirinta. Lasta ŝia letero por mono estas el Boston, Massachusetts, sinjoro.

Tio okazas, li klarigis, li estis tro ekster la hejmo. Boulder-Dam, Parker-Dam — li lasis ŝin hejme en Omaha. Ĉu ni konas Jozefon W. Tate, danciston, famegan step-fakulon? Li elkore salutas Mrs-on Nance en Boston, Massachusetts, se vi atingos ŝin!

Mr Duval do veturas nun rekte Bostonon; li jam ne povas eljeti monon por avionoj, sed ankaŭ tiamaniere li estos tie post tri tagoj. —

— Nu, sulkigis frunton Mr Wood — mi bedaŭras, sed al tiela ino mi volus, mi diras — nu jen — sen ofendo, sinjoro! Kun dancisto? Do ŝi forkuris kun stepfakulo. Kaj vi malgraŭ tio —

Mr Kinsey modeste konsentis. Li diras, li rimarkigas, tio estas nature, kompreneble, okulvide okazintaĵo pure eŭropa, nesaĝa. Rekonsciigu. Mr Duval! En vivo de sinjoro Kinsey aperadis tiaj kaj tielaj inoj, li do povas konsili al Mr Duval —

Mr Duval mangestis. Jen — frapetis li sur tablotukon — la diferenco inter Eŭropo kaj Ameriko, sinjoroj! Io pli ol Atlantiko, kio nin dividas. Tiu virino en Curtis-Jarlibro estis ja bela super ĉia ajn imago. Sed kio estas simpla beleco por kulturita animo Eŭropana? Eŭropa belartisto? Mizeraj biznismenoj el Okcidento!

— Sed ja — la animon vi tamen ne konis! permesis al si Mr Wood, evidente tre leginta (vojaĝanta agente kun glaciŝrankoj! enuohoroj en pulmanoj!). — La animon vi tamen el fotografiaĵo ne povas —

Komanda gesto de Duvala dekstra mano. Li fermetis okulojn.

Animo, beleco, tiu, kiu estas al banalaj okuloj nevidebla, revelacias sin al fajnaj historoj de viroj el Oriento. al homoj, en kiuj fluktudas esenco de praantikvaj jarmilaj kulturoj; ĝi aperas en detaletoj, en nefrapantaj, nekapteblaj signoj, en mistikaj signaloj, per kiuj interkomunikiĝas Elektitoj inter blinduloj en grego. Glendoraj frukto-ŝrandolantejoj! Westinghouse-glaciŝrankoj! Mizeruloj!

Kaj tie ĉi, tie ĉi ekparolis punkteto sur nazo. Nura malgranda punkto, nura lentugo pelĉasis ĝis fino sinjoron Duval! Nura malgrandeta lentugo.

— Punkto sur nazo, flustris sinjoro Kinsey — nu jes —

Malsagaculoj, ili ne komprenas tion. Malgranda punkto sur nazo, punkto lokita proksimume en mezo de la kuniĝa linio de la nazpinto kaj naza bazo, sed iom maldekstre.

— Iomete maldekstre, informis Mr Duval. Tie ĝi sidas. Ĉu vi komprenas? Punkto preskaŭ videbla. Kaj la tuta mondo, ĉia senco de la vivo, kompleta ekvilibro de belo, ekvilibro de animaj proporcioj fariĝas perfekta nur per tiu ĉi punkto; nur nun jena mieno estiĝas inda de adorado kaj estas komprenebla al koro agordata kun kosma absoluto. Tuta tiu beleco estas alie malplena, banala, obtuza, grega, amerika. Ne ekvilibrita, ne sanktigita per postsignoj de dia manplato. Mi estas belartista, sinjoroj. Dio atestu, sen tio mi estus foliuminta en Curtis-jarlibro kaj mi ne rimarkus, mi ne estus trovinta taŭge halti sur tiu paĝo. Sed kosmo, kiu koncentriĝis en tiu unusola punkto, transformas vizaĝon en miraklon de spiritiĝo. Dek kvar mil kilometrojn ĝis nun, sinjoroj, kuras Mr Duval sur Ameriko — kaj nur malgranda punkto sur nazo estas celo de ĉio tio — lentugo —

Ni silentis.

Punkto, kiu ordiĝas harmonion de sferoj. Ĉu vi komprenas, ke per unusola vorto oni povas detrui romanon aŭ fari ĝin inda de mondpremio? Per unusola punkto sur netaŭga loko disrompi ekvilibron de bildo, per unusola punkto ekvilibriĝi plenecon de pentraĵo? Ĉu vi ne komprenas, vi barbaroj, frizistoj amerikanaj?

La ambaŭ amerikanoj mallevis malplezure kapojn. Ho, malprograsa Ameriko, amanta mienojn kaj femurojn sen unusola lentugo, sen esprimo, sen kosma ekvilibriĝo! —

Sed mi ekstaris. Malgranda punkto sur nazo komencis altiradi min, eŭropanon, per pereiga forto. Mi kuras en mian pulmanon, mi eljetas kofron sur liton. Ĉar ankaŭ mi estas aĉetinta la

Fotografian Curtis-jarlibron, antaŭ unu monato en San Francisko. Mi kuregas kun ĝi returnen. Jen, jen, la jarlibro, montru —

Li senatente kombis inter la folioj; li trovis ŝin tuj. Ni kroĉis nin al ŝi. Ni tri. Mieno efektive pompa. Mi rekonsciĝas, mi mem enpeniĝis super ĝi tiam, foliumante la Jarlibron tiam en lito en Monterey.

Poste Mr Kinsey:

— Sed la punkto — kie estas la punkto? Tie ĉi estas nenia lentugo. Ega sinjorino ŝi estas, ho jes; sed mi tie ĉi ne vidas ian punkton.

Hararo de Mr Duval kliniĝis inter niajn kapojn. Oni aŭdis sole radofrapojn sur juntoj. Poste palpis Mr Duval sian tekono; li eltiris sian Curtis-jarlibron. Kaj ree ni kliniĝis super la tablo. Estis tie punkto. Poste Mr Wood, frapetante per montrofigro sur malgrandan punkton sur la nazo de Mrs Nance en Duval-jarlibro, diris seke:

— Difekto en la papero. Vi havas ekzempleron kun difekto. En Curtis-jarlibro! Kiu tion dirus? Mi vetas, ke tiam li aĉetis paperon de tiu fripono Ben Fulton kaj ne de Morgan Adams limited. Fidu al mi, mi laboris ankaŭ en tiu ĉi branĉo!

Kaj vidante vizaĝon de Mr Duval, kiun prikskribi ne eblas, li plipezigis lian malleviĝintan ŝultron per sia bonula manplato:

— Supren la kapon, amiko! Lentugon, bezonan por kreo de kosma ekvilibro en la vizaĝo de Mrs Nance, oni faros ja al vi malmutekoste en ĉiu kosmetika salono. Ek al Boston, Massachusetts!

(Aperis en j. 1939.) El la ĉefia tradukis S. K.

Ĉu propagando?

Nova ondo de Esperanto-propagando bezonas novajn rimedojn. Tamen ne ĉiuj malnovaj estas malbonaj. Federacio de Laboristaj Esperantistoj el Amsterdam invitis k-don Pelcman el Plzeň por ĉeesti federacian kongreson dum marto kaj poste prelegi dum tri semajnoj en la grupoj. Ja ne estas facile, precipe por laboristo, ricevi necesan konsenton de la ŝtatinstantoj por eksterlanda vojaĝo. Necesas granda persisto por sukcesi. La permeso venis tro malfrue eĉ por partopreni SAT-kongreson en Aarhus. Post la venko de pasportaj aferoj mi ekvojaĝis la 7-an de aŭgusto el Praha tra Polio al Gdynia, kie mi partoprenis internacian tagon de polaj esperantistoj. Multaj fidelaj pioniroj ekzistas en Polio. Per ŝipo mi venis al Malmö en Svedio, kie estas modela grupo de laboristaj esperantistoj. Per alia ŝipo mi venis al Kobenhavn en Danio, kie zorgis pri mi amiko P. Thorsen kun multaj aliaj. Per skandinavia ekspreso mi venis al Amsterdam kaj ekloĝis laŭ afabla invito ĉe familio Veen. En tiu urbo, kie okazos SAT-kongreso 1948, vivas kaj laboras multaj eminentaj esperantistoj. Estis por mi kvazaŭ esperantista universitato, vizitado de unu post la alia. Diskutoj viglis, demandoj kaj respondoj abundis ankaŭ en aliaj lokoj en Nederlando. Nederlando ja estas vera esperantio kaj por ĉiu, eĉ sperta esperantisto, tre instrua. Post Amsterdam mi vizitis, dank' al la afableco de multaj gek-doj kaj eĉ neŭtralaj esperantistoj, Naarden, kie estas tomo de Comenius, Blaricum, Scheveningen (la redakcio de Heroldo), Den Haag, kie zorgis pri mi k-do Ŝvarc, de kie mi sukcesis partopreni kaj saluti tutŝtatan komunistan feston, kie ĉeestis proksimume 90.000 nederlandanoj (en Birkhoven). Pliaj urboj estis Rotterdam, Amersfort, Hilversum, Zaandam, Harlem.

Mi konstatis ĉie inter gek-doj grandan amon al la movado kaj oferemon, kun kiu ili klopodis faciligi kaj

agrabligi mian restadon inter ili. Mi sentis ĉie, ke mi vivas inter inteligentaj kaj tre lertaj esperantistoj, kiuj la lingvon praktikas en ĉiu okazo. Ĉie en esperantistaj loĝejoj mi vidis bibliotekojn kun ĉiuj valoraj verkoj en Esperanto. Preskaŭ ĉiu grupo eldonas propran bultenon. En Amsterdam dum SAT-konferenco la 14-an de septembro mi vidis naskiĝantan 21an kongreson.

Ne volonte mi adiaŭis, Nederlandanoj, vian societon kaj vian belan landon por reveni. En Flensburg mi konatiĝis kun kelkaj germanaj esperantistoj pro la fakto, ke miaj vizitoj senvalidiĝis. Kontraŭ donaco de libro „Nevenkebla ĝeno“ oni helpis min reveni al Hamburg, kie kun afabla helpo de ĉefoslovaka ambasadoro mi ordiĝis la aferon kaj daŭrigis poste al Kobenhavn en societo de geedzoj Adamson kaj Blajer. La vojo returne jam pensigas pri la rezultoj. Impresoj estas tre fortaj kaj amikoj tre multaj, kiu mem taksu kaj kritiku la entreprenon.

Post adiaŭo kun P. Thorsen, ĉe kiu mi vivis kiel frato, mi venas vespere en Malmö kun ne certa sinteno, ĉar mi perdis 5 tagojn en Germanio. Felice kunveno de ĉiuj invititoj okazas en luksa ĉambro de sindikata domo, kie svedoj ŝatis aŭskulti min. De k-do Norman mi ŝatis aŭdi la dubojn pri forta slavismo ĉe socialistoj en orientaj landoj. Adiaŭo en stacidomo de Malmö estis por mi kortuŝa kaj neforgesebla, amikeco ligas min al multaj.

Per la ŝipo, kiu sufiĉe balanciĝis pro aŭtuna vento, mi venis al Gdynia, al miaj amikoj en Vrszef kaj alian tagon mi veturis al Varsovio. Landa kongreso de poloj estis sukcesa. Krom kelkaj amikoj, kiujn mi renkontis en Gdańsk, mi konatiĝis ĉe la tomo de la Majstro kun juna Zamenhof kaj kun multaj idealismaj batalantoj.

Kongreso en detruita urbo estis verko multe peniga. Laŭplane mi revenis al Praha kaj al mia familio, kiu jam vegetis pro mia longa foresto. J. Pelcman.

La Esperanto-semajno en Zaandam kaj mia prelegvojaĝo tra Nederlando

Kiel bela sonĝo forpasis la tempo... Jes, vere mi estis en Nederlando — ĉar mi vidas ĉi tie la belegan teovarmigilon, la teokuleretojn, fotografajojn, hiacint- kaj tulipbulbojn ktp. ktp. Kaj tie kuŝas libroj, muzikajoj, bildoj...

Mi klare vidas la afablajn vizaĝojn de miaj karaj gastigintoj — van Haren — Ebeling — Rosmalen — Poort — Sterken — Bloemendal — Schwartz — Koorn — Smitt kaj tiel plu, kaj tiel plu.

En miaj pensoj mi kun ili interparolas... Kion diri pri ĉio? Mi povus skribi dum tagoj kaj noktoj, mi povus verki longegan artikolon — sed, ĉu mi povos iam elĉerpi tiun riĉegan materialon, kiun mi dum ses semajnoj kolektis, pri homa amikeco, modela gastemeco, afableco, pureco kaj beleco, kiujn mi spertis kaj vidis?

Post du urĝaj invitoj mi sukcesis ricevi pasporton kaj vizojn.

La 11-an de septembro mi eniris Nederlandon. Post du tagoj en Amsterdam mi iris al Zaandam, kie ni estis entute 25 eksterlandanoj el 12 landoj. „Esperanto-semajno“ — tre simpla nomo por la grandioza entrepreno! La Zaandamanoj faris mirindan laboron! Ĉio funkciis laŭplane, senerare, laŭminute. Ne estas eble en ĉi tiu artikolo rakonti detale; mi nur volas montri mallonge, kion oni faris dum la semajno.

La urbestro alparolis la ĉeestantaron esperantlingve; ni, eksterlandanoj, dankis per kelkaj vortoj. Mi transdonis al la urbestro leteron de la urbestro de Prostějov. Oni invitis nin al mikrofono por diri kelkajn vortojn pri niaj impresoj en Nederlando. — La ĉeestantaro vizitis la monumenton de la militviktimoj kaj ornamis ĝin per granda bukedo.

Posttagmeze okazis vizito de granda ligno-fabrika. En loka kinematografo montris hungaraj kaj aŭstraj samideanoj bildojn de siaj landoj.

Vespere okazis koncerto en la salonego Albert Heyn. En la programo partoprenis la Zaans-Kamerkoor per kantado, du lokaj pianistoj kaj unu violonisto, kiu ludis inter aliaj verkoj ankaŭ la Sonatinon, op. 100, de Ant. Dvořák. Mi mem ludis verkojn de Dvořák kaj Suk.

Tiel pasis la unua tago, la 15-a de septembro. Poste mi partoprenis ekskursojn al Edam (akcepto per la urbestro en la urbdomo), Volendam, Oosthuizen (akcepto per la urbestro, poste amuza vespero). Tie ni ankaŭ vizitis lernejojn kaj ĉeestis Esperanto-instruadon de infanoj.

Tuttaga ekskurso al Rotterdam estis farita aŭtobuse. Akcepto per la urbestro en la belegaj salonegoj de la urbdomo. Poste ŝipveturado tra la vasta haveno, vizito de la fabrika Haka, tie ni ricevis lunĉon, kaj de ties tegmento ni rigardis la urbon. Poste aŭtobusa rondvojaĝo, traŭro de la submaasa tunelo (grandioza verko!). La lokaj gesamideanoj invitis la gastojn por tagmanĝo en iliajn hejmojn. Vespere ni kunvenis en granda ĝimnastikejo, kie en plenplena salonego okazis amika vespero. Ni revenis al Zaandam meznokte.

Ĵaŭde la 18-an: Vizito de lako-fabrika Peter Schoen en Zaandam, de ladofabrika en Krommenie. Vendrede al fromaĝourbo Alkmaar, norden al Lutjewinkel, al Kolhorn, kie nin akceptis esperantlingve la urbestro kaj kie oni montris al ni fotografajojn de la tempo milita, kiam la germanoj subakvigis la regionon. Nun al Den Dever, kie komencas la granda digo, kiu fortranĉas la „Sudan Maron“ (Zuiderzee) de la Norda maro. En banloko Bergen gaja vespero kun belega filmo: Nederlando en printempo, somero, aŭtuno kaj vintro. Reveno al Zaandam meznokte.

Sabate esperantista kunveno en granga ĝardeno, kie paroladis s-ro van Haren el Amsterdamo kaj kelkaj eksterlandanoj (Stuttard el Anglio, Rosendahl el Norvegio, Berceli el Hungario) pri la temo: Tial Esperanto! Amuza vespero en Dus Huis.

Dimanĉe per ekskurso al Amsterdam finiĝis la granda festo.

La 23-an de septembro komenciĝis mia rondvojaĝo tra Nederlando. Mi vizitis entute dudek sekciojn de la Asocio de laboristaj esperantistoj kaj parolis ĉie pri mia lando. Mi povis ankaŭ montri ion de ĉeĥa muziko. En ok lokoj

mi preparis pli longan muzikan programon, montrante ion de niaj klasikaj verkistoj (Tomášek, Voříšek), ion de la verkoj de nacia epoko (Smetana, Dvořák, Fibich, Nešvera) kaj fine ion de niaj modernaj komponaĵoj (Novák, Suk, Petřelka, Ambros, Müller).

La publiko estis atenta kaj montris multe da intereso. Laŭ la multaj demandoj mi povis konstati, ke oni ne estas bone informita pri la ĉirkonstancoj en nia lando. Ekzemple: multaj pensis, ke Ĉeĥoslovakio estas okupita de la rusa armeo, kiel ekzemple Germanio, Aŭstrio aŭ Hungario. Mi do devis klarigi, ke ni ja ne estis inter la malamikoj de la unuigitaj nacioj, ke niaj viroj batalis kontraŭ la germanoj. Oni pensis, ke niaj gazetoj ne havas sufiĉe da libereco kritiki la registaron ktp. Multaj kaj interesaj estis la demandoj pri nia vivado dum la milito, pri la nuna stato ktp. ktp. — kaj mi estis kontenta, ke mi povis klarigi la malklarajn aferojn. — Ankaŭ la nederlanda loĝantaro suferis dum la milito kaj oni batalis en Nederlando kaj aspekto de multaj lokoj (Rotterdam, Arnhem, Deventer, Enschede, Groningen ktp.) tion pravas, kiel ĉe ni Brno, Ostrava, Opava ktp. Tiuj suferoj proksimigas ambaŭ naciojn.

Ankaŭ ĉeĥa muziko interesis la ĉeestantaron. Mi konstatis, ke oni konis kelkajn grandajn muzikverkistojn ĉeĥajn, sed ne multe da verkoj. Smetana, Dvořák kaj Suk ne estis tute novaj al la nederlanda publiko. Mi konstatis entute, ke oni plej multe ŝatis la verkojn de Smetana, Dvořák kaj precipe Nešvera. En unu loko oni petis min speciale ludi la „Poëm“ de Fibich.

Mi dankas al ĉeestantoj por la modela atentemo kaj intereso; mi dankas por la belegaj floroj kaj por la amaso da belegaj donacoj. Mi dankas por la belaj, amikaj vortoj, kiujn oni al mi direktadis kaj por ĉiuj esprimoj de amikeco kaj kompreno. Mi neniam forgesos tiujn vesperojn.

Jen mia rondvojaĝo:

En septembro: 23. Wormerweer; 24. Schagen; 25. Beverwijk; 26. Eindhoven; 27. kaj 28. Heerlen; 29. Arnhem; 30. Deventer. En oktobro: 1. Enschede, 2. Groningen; 3. Leenwarden; 4. kaj 5. Amersfoort; 6. Rotterdam; 7. Schiedam; 8. Haag; 9. Utrecht; 10. Leiden; 11. kaj 12. Haarlem; 13., 14. kaj 15. Amsterdam. La 16-an de oktobro mi ĉeestis la kunvenon de la ĉefestraro de la Asocio de laboristaj esperantistoj en Amsterdam.

Nederlandanoj — ĝis revido!

Marie Havránková (Prostějov).

Ni multe bedaŭras devinte — pro spacomanko — mallongiĝi la interesan detalegan artikolon. Tamen ni devas aldoni kelkajn liniojn, kiujn ni ĉerpis el la amsterdama Laborista Esperantisto (nov. 1947), alportanta serion da raportoj pri la sukcesa vojaĝo de nia samideano.

Wormer: La prelegantino havigis al ni instruan vesperon per siaj bildoj pri Ĉeĥoslovakio kaj per sia belega pianludo. — Eindhoven: La prelego okazis en kunlaboro bonharmonia kun la katolika kaj kristana sekcioj. Ni akiris impreson de bela lando kaj fervora popolo. Emo vekigis por vidi ĉi ĉion kaj vojaĝi al tiu lando. — Leeuwarden: Ni estas plene kontentaj pri la programo kaj la prelegantino. Tro malofte ni vidas tiajn samideanojn en la nordo. Ili povas multe kontribui al la klerigado de nia membraro. — Simile parolas la aliaj raportoj.

INTERNACIA KULTURO

Progresema, demokrata revuo, eldonata de balkanaj esperantistoj. Grandformata, ilustrita revuo kun bonstilaj interesaj artikoloj. — Abonprezo por 12 numeroj de la III-a jarkolekto 1948 Kĉs 100.—, pagotaj al pŝp kto 12.371 de EAĈSR.

Le g u k a j a b o n u !

KRONIKO ENLANDA

Ĉs. geografia kongreso. De 29-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro estis en Praha kongreso de ĉeĥoslovakaj geografoj. Ĉeestis 700 mezlernejaj kaj altlernejaj profesoroj, instruistoj kaj aliaj fakuloj. Profesoro Klement Urban, aŭtoro de la mezlernejaj lernolibroj pri geografio, parolis pri la plej efikaj rimedoj por stimuli intereson de la lernantoj por geografio. Fine profesoro Urban diris: »Ne taksebla estas Esperanto kiel metoda helpilo. Korespondante kun fremdlandaj studentoj ricevas niaj lernantoj tute alian aspekton kaj superrigardon pri la koncernaj landoj, kiuj estas en la lecionoj studataj. Mi povas al vi rakonti okazaĵon el mia propra vivo. Antaŭ jaroj mi estis en Anglujo, en la urbo Newcastle. Tie mi havis mian korespondanton, laŭprofesie ministron. Li ebligis al mi viziton de minejoj kaj kondukis min al la direktoro de la tieaj karbominejoj. La riĉa anglo interesiĝis pri diversaj niaj entreprenoj kaj specialaĵoj kaj poste min surprizis per sia demando: »Kiel aspektas viaj havenoj?« La simpla ministro, kiu staris malantaŭ la sinjoro direktoro, palpebrumis ironie al mi, kaj ni ambaŭ pensis la samon: Kiom pli saĝa vi estus, kara sinjoro, se vi korespondus esperante kun iu ĉeĥoslovakulo. Tiam vi certe sciус pli bone, kie situas de vi nekonata lando de ĉeĥoj kaj slovakoj.«

Post la prelegoj estis diskutado. Mi anoncis min, ke mi volas ion diri al la temo. Mi atentigis pri la ekzisto de esperantistaj adresaroj. Laŭ ili oni povas elekti al si landon kiun ajn de la tuta mondo, ĉar ne ekzistas lando, kie ne estus esperantistoj. De tiuj siaj novaj amikoj oni ricevas ilustritajn poŝtkartojn, leterojn, flugfoliojn, gazetojn, librojn, eventuale aliajn sendaĵojn, kiuj plivivigas la instruadon de geografio, ĉar ili vekas varman intereson pri la lando kaj popolo.

Post la foriro el la prelegejo alvenis al mi kelkaj ĉeestintoj kaj diris: »Do estas tamen io ĉe tiu Esperanto, mi devas ĝin rigardi,« alia eĉ diris »lerni«. Post la prelegoj estis ekskurso en la nordan limmontaron. Dum la reveturo mi spertis efikon de la mencio pri Esperanto. Ĉiu volis ion scii pri la lingvo de Zamenhof, kaj la tutan vojaĝon ĝis Praha havis nia kupeo la unuan lecionon de nia lingvo kaj fervore ili al si notis la adreson de nia »Esperantista«. Eble ne havos ĉiuj la persiston finlerni nian lingvon, sed ĉiuokaze ili ricevis la konvinkon, ke Esperanto estas pli ol lingva projekto kaj ke ili nian povos malatenti ĝin dank' al prof. Klement Urban. (Dr. H. Jokl.)

Ekzamenoj pri Esperanto ĉe Ekzamena komisiono de Esperanto-Asocio en ĈSR okazis la 29-an de novembro en Praha en ejoj de la Lernejo por virinaj profesioj (II. U pŭjčovny 5) je la 19—23-a horo. Prezenti sin ĉe tiu kunsido al ekzameno unuagrada (pri scio de Esperanto) du virinoj, al la duagrada (pri kapableco instrui E-on en lernejoj kaj kursoj) 6 viroj kaj unu virino.

Ekzamenis tri ekzamenaj senatoj: Unua (por ekzameno unuagrada) Ota Ginz kaj Josef Vondroušek, dua: Dr Stan. Kamarýt prezidanta, Dolfa Bartošik kaj Dr Aug. Pitlík, tria prof. J. Kožený, prezidanta, Ing. Lad. Krajic, prof. Miloš Lukáš (ambaŭ por la duagrada ekzameno). Hejmajn taskojn legis kaj klasifikis Dr Tom. Pumpr kaj Dr Stan. Kamarýt, skribajn taskojn antaŭ la komisiono klasifikis Dr T. Pumpr.

Rezultato de la ekzamenoj estas la jena:

Diplomon pri lingva scio de Esperanto ricevis Jana Čichová-Schäferová, oficistino en Praha, kaj Ludmila Kavková, faka instruistino en Přerov.

Diplomon pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis (en krampoj estas temo de la hejma tasko):

Zdeněk Hršel, studento en Hradec Králové (Signifo de universalaj kongresoj de E.).

Ing. Josef Kochman, profesoro en Praha (Teknika kulturo).

Alois Kubala, pensiulo ministra en Ostrava (Esperanto-movado inter ĉeĥoj).

Karel Píč, oficisto de ONV en Polička (Super-signitaj literoj en Esperanto).

Zdeněk Raška, redakcia sekretario en Ostrava (Resono de Esperanto-disaŭdigoj el Ostrava).

Lidmila Rejthárková, studentino en Hradec Králové (Virinaj profesioj).

Stanislav Váňa, studento de medicino en Hradec Králové (Kelkaj problemoj de moderna medicino).

Ĉe la unuagrada ekzamenoj estis donitaj notoj »eminente« kaj »tre bone«, ĉe la duagrada unu »eminente kapabla«, tri »tre bone kapabla«, unu »bone kapabla« kaj du »kapabla«.

La ekzamenitoj akceptu nian gratulon pro ilia sukceso kaj sinceran dankon pro ilia sindediĉo al la lingvaj studoj.

E-instruado en burĝaj lernejoj en Liberec, kies komencon ni sciigis sur paĝo 94, estis baldaŭ post la komenco grandparte ĉesigita, ĉar la Landa lerneja estraro (Zemská školní rada) respondis al la oficiala demando de la distrikta lerneja komitato, ke ĝi ne permesos enkondukon de laŭvolaj fakoj, kiuj ne estis instruataj en la pasinta jaro. Tial devis estis la jam komencita instruado de 325 studentoj ĉesigita en fino de septembro. Sole direktoroj de la burĝa lernejo I. kaj IV. s-oj Fibrich kaj Knížek daŭrigas la instruadon sen honorario. Ili instruas sume 75 studentojn, kiuj vidigas spontanegan intereson: ili ekzemple mem petas plilongigi la lecionojn. La direktoj de tiuj du lernejoj petas, ke la Landa lerneja estraro permesu tiun oficialan instruadon almenaŭ senpage.

Direkcio de ŝtataj fervojoj en Brno per dekreto n-ro 811/11—VIII—47 el 13. IX. 1947 anoncis, ke estos komencita kurso de Esperanto por fervojistoj kaj en aparta alineo ĝi koncize rekomendis lernadon de E. »Ĝia scio havas apartan

gravecon por fervojistoj tiom en kontakto kun fremdlingva publiko, kiom por vojaĝado fremdlandon. Esperanto faciligas ekligi kontakton kun fervojistoj de diversaj ŝtatoj kaj nacioj.» Per dua dekreto n-ro 811/14—VIII—47 ĝi informis ĉiujn siajn oficejojn, ke kurso de Esperanto por fervojistoj komencos la 9-an de oktobro. La kurso komencis kun 25 p., gvidata de ĉefa konsilisto de ĉs. fervojoj Josef Friedrich.

Solena vespero kun arto-koncerto en Praha, kiun aranĝis EK por honorigi 60 jarojn de Esperanto kaj 45 jarojn de la Klubo, okazis la 22. XI. 1947 en la salonego de »Ženský klub,« Praha II, Smečky 26.

Programo: Dr. L. L. Zamenhof: »Mia penso« — deklamo kaj danco; prezentis gefratoj Eva k. Milo Nývlt.

Solanen paroladon havis prez. de EK. Jar. Šustr. En la nomo de EAĈSR parolis prez. Ad. Malík. El la pioniroj de nia movado parolis s-oj R. Hromada kaj Dr. A. Pitlík. Senditaj salutleteroj kun rememoroj je la temo »Kiel ni komencis kaj laboris« de ges-oj Jos. Krumpholtz, Th. R. Čejka, Julie Šupichová, Václ. Čánský, H. K. Bouška kaj sprita salutletero de EK Hradec Král. estis tralegitaj kaj akceptitaj de la ĉeestantaro kun vera intereso kaj aplaŭdo.

Sekvis longa vico de artaj prezentadoj, kiujn prizorgis membroj de la Klubo: kantoj (s-inoj Vlasta k. Milena Zvědělíkové), muziko (PhC Jan Geryk - violono, Jiří Šourek - piano), deklamoj (Jar. Mařík, Alice Fryšová), recitativon »Invado« de J. Kohout prezentis la kolektivo de kluba »Junularo« sub gvido de M. Nývlt; ĝi estis bela kaj ĝojiga surprizo. La soleno finiĝis kun la deklamo de »Preĝo sub verda standardo (Jan Vařeš), kiu estis akompanata per la filmo kun nia Majstro (A. Slanina).

La soleno havis tre bonan sukceson; ĉeestis ĉirkaŭ 200 personoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj, episkopo de Ĉeĥoslovaka eklezio Dr. Novák kaj angla redaktoro Stephan Jolly.

En la kadro de la programo ricevis prezidanto de la Klubo s-o Jar. Šustr donace arte aranĝitan diplomon de la komitatanoj, kiel rememoron kaj dankesprimon okaze de 20jara jubileo de lia fervora, meritplena kaj oferema laboro por Esperanto en la gvido de EK-Praha.

La programo daŭris ĝis la 23.30 h. kaj ĉiuj ĉeestantoj, montrante veran ĝuon kaj intereson, restis ĝis la fino. Poste kunvenis ankoraŭ rondo de 30 gesamideanoj en klubejo de Aeroklubo por amika kunesto.

Por la belgusta aranĝo de la scenejo meritis ges-oj T. k. M. Balda, L. Kynčl kaj V. Lorenc. Teknikan aranĝon prizorgis Tomáš Balda, prezentadis Ant. Slanina. (Sv)

Novaj lernolibroj slovakaj aperis: **O k i e n k o d o s v e t a**, učebnica Esperanta, de J. V. Dolinský, 64 paĝoj, 30 Kčs (presita), kaj **Esperanto v 14 úlohách** de E. V. Tvarožek (ciklostilita), 28 paĝoj, 15 Kčs.

Jan Neruda:

ADAMO

(LA LASTA JUĜO)

*Mondfino... Kreviĝinta ter' tiridas,
trompet-eksonoj al ĉiel' rapidas,
pordego ora, kiel fulm' brilanta;
kaj fluas la homaro en sufokoj —
la ŝaŭmon kvazaŭ vent' estus pelanta —
al juĝejloko, Jozafataj rokoj.
Eksidis Di', homaron frost' ektuŝas.
„Adamon al mi! Ĉu li ĉiam kuŝas?“
Sed jen Adam', la paŝo multepeza,
tra mutaj vicoj de anĝel' gvidata,
kun vangoj palaj kaj okul' frenezata,
pro pun' venonta ege timigata.
„Li ne plu dormis, nur okulojn baris,
kaj mian manon forte kontraŭstaris!“
Adamo al la ter' genuojn premas,
per frunt' la tronon batas, dolorĝemas.
„Kompatu, Di', min en la sankta loko —
la rememor' min ĉiam ĉagrenigos! —
ne sciis mi la kaŭzon de l'alvoko,
mi timis nur, ke vi min reedzigos!...“*

Trad. Voĉo

Kurso en laborista revuo. La dusemajna gazeto **P ř e d v o j**, la organo de Svaz dělnických tělocvičných jednot ĉs. (Federacio de laboristaj gimnastoj) publikigas kurson de Esperanto de H. K. B o u ŝ k a. La unua leciono aperis en la 19—20 nro de la 25. oktobro 1947, danke la iniciaton de samideano **Č e r m á k**.

Regiona laborkunveno de la VIII. regiono en Liberec, la 17—18-an de majo, kunveniĝis ĉ. 50 p. el Liberec, Jablonec, Tanvald, Hradec Králové, Ústí n. L. k. aliaj. Sabaton vespere donis prez. de la E. K. St. Knížek raporton pri la fininta kurso, kiu finis kun 19 kursanoj, kiuj faris kursekzamenon, kaj el kiuj 15 aliĝis al la Asocio, 2 al IEL. Dimanĉon en la laborkunveno prezidanta Teo Novotný prezentis laborplanon, kies ĉefa ero estu propagando. Klubo aŭ rondetoj provizore ekzistas en Vesec, Vratislavice, Hodkovice, Hrádek n. N., Chrastava, Krásná Lípa, Jablonec, Tanvald, Česká Lípa. Klubo en Jilemnice kaj Žel. Brod estos revivigitaj.

Československá filatelie

Vás spojí s celým světem.

Vychází čtrnáctidenně. Roční předplatné 72 Kčs, jednotlivá čísla 3 Kčs. Ukázkové číslo zdarma. — Objednávky řiďte na administraci časopisu »Československá filatelie«, Praha I, Národní 9.

LINGVO

Rimarkoj pri adverbo »ja«

Antaŭ kelkaj monatoj aperis bonega lernolibro de E., kiun por uzado internacia verkis Lud. Kökény. La redakcio de „Esperantista“ por frapi per unu bato du muojn korektis 50-on da eraroj, eraretoj kaj kvazaŭ-eraretoj el tiu ĉi libro en la 12-a tasko de la rubriko Lingvo („Oni lernu per eraroj“). La eraroj parte koncernas la uzadon de artikolo, de malĝustaj esprimoj, pleje prepozicioj kaj parte la uzadon de „ja“. La aldonitaj klarigoj de la redakcio faras la ellaboritan taskon instrua kaj pro tio daŭriginda.

Post tralego de la korektoj kaj klarigoj mi preskaŭ plene konsentas kun la taskodoninto kaj klariginto „bh“. Mi akcentas: nur „preskaŭ“, ĉar ekzemple la uzadon de adverbo „ja“ en maniero, kiel ĝin uzas la aŭtoro — mi ne trovas riproĉinda. **Ja nenia regulo ekzistas en Esperanto, kiu preskribus ĝian lokon en la frazkonstruo!**

Kompilante mian slovakon-esperantan vortaron kiel ankoraŭ ne tro sperta esperantisto, ĉe la klarigo de la vorto: „ved — ja“ mi faris parenteze ne plene motivitan rimarkon: „býva zväčša pri slovese“. La opinio de „bh“ koncerne la lokon de adverbo „ja“ identas kun mia rimarko.

Sed kion diras la Plena Vortaro de SAT pri la uzado de „ja“? Nenion eksterordinaran. Ĝi simple registras ĝin kaj donas ekzemplojn pri ĝia uzado. El kvin ekzemploj nur en unu troviĝas la vorto „ja“ post la verbo, en la ceteraj kvar ekzemploj ĝi estas lokita inter la person-pronoma subjekto kaj verba predikato. Se la loko de „ja“ estas en la frazo tiom grava, kiel iuj esperantistoj opinias — la PV certe atentigus pri tiu ĉi loko, kiel tion faras ĉe vortoj „ne“, „ankaŭ“, „ankoraŭ“ ktp.

Mi ne intencas citi ĉi-loke aron da ekzemploj, en kiuj „ja“ troviĝas ne post la verbo. Mi citos nur unu ekzemplon de Zamenhof mem: „**Ja se vi agos bone, vi estos forta; sed...**“ (Genezo, 4. ĉapitro, 7. verso). En tiu ĉi citaĵo ĝi estas lokita frazkomence. **Ĝi staras do sur la plej emfaza loko de la frazo!**

Ni konsideru, ke „ja“ havas du ĉefajn karakterojn: a) akcentan, ĉi-sence respondas al ĝi ĉefe: **v ĉy d y t, slova-ke: ved kaj hungare: hiszen, b) klarigan kun signifo en la tri lingvoj: ovšem, pravda, persze.**

Por la akcenta „ja“ la plej konvena loko estas la frazkomenco:

- a) **V ĉy d y t se blížily velké svátky, vánoce**
Ved sa blížily veľké sviatky, Vianoce.
Hiszen nagy ünnep közeledett, a karácsony.
Ja proksimiĝis granda festo, la kristnasko.

Por la klariga „ja“ la natura loko estas antaŭ la verbo aŭ post ĝi:

- b) **Teta nás ovšem navštívila před vánoce, ale...**
Teta nás pravda navštívila před Vianocami, ale...
Nénénk persze meglátogatott karácsony előtt, de...
La onklino ja vizitis nin antaŭ kristnasko, sed...
aŭ: **La onklino nin vizitis ja antaŭ kristnasko, sed...**
Loki la vorton „ja“ ĉiukaze post la verbon estas mia opinie misa faro, ĉar tiamaniere ni senigus la sence diferencajn frazojn je ilia efektiva senco kaj altrudus al ili multokaze sencojn nekonvenajn. (J. V. Dolinský.)

Překlad 13. úkolu

La politika kvietiĝo¹ malrapide² progresas³ kaj cedas⁴ la lokon al solvado de ekonomiaj necesoj. El ili, sur la unuan lokon estis metita⁵ la tasko starigi longtempan ekonomian planon. Tri socialistaj partioj jam prezentis⁶ al la registaro siajn proponojn kaj en speciala kunsido de la Centra Plan-komisiono⁷ la prezidanto registara⁸ skizis la taskojn kaj celojn de la kvinjara plano ĉeĥoslovaka. Ĝia celo⁹ estas fundamenta ŝanĝo en la strukturo¹⁰ de la ĉeĥoslovaka ekonomio en la direkto [ek]de la malpeza industrio (vitro, porcelano, ceramiko,¹¹ teksaĵoj k. a.) al la peza industrio, precipe la maŝinfara kaj metallabora ĝenerale.¹² Premiso¹³ por tiu ŝanĝo estas investa plano en amplekso de 340 miliardoj en kvin jaroj, kaj ŝanĝo¹⁴ en la orientiĝo¹⁵ de nia eksporto per ĝia pligrandigo al la landoj de la orienta kaj sudorienta Eŭropo, ĉefe al landoj slavaj kaj entute landoj kun planata ekonomio. La pro-

ponoj de longtempa planado, ellaboritaj de (unuopaj) partioj havas multe da tuŝpunktoj;¹⁶ diferencoj troviĝas sole en akcentado de iuj principoj akorde¹⁷ kun la programvidpunktoj de la partioj. Tasko de la Centra Plankomisiono estas ellabori unuecan, interne harmonian¹⁸ kaj, al nia situacio respondantan, longtempan planon.

Překlad tohoto textu, v němž se vyskytuje tolik slov dnešních našich novin, zaslalo celkem 14 čtenářů. Byli to pp.: Čížek Jar., Praha; Dlabal S., Praha; Hanuš Jos., Česká Lipa; Hladík Ant., Kostelec n. L.; Ing. Kochman Jos., Praha; Kuba Fr., Olomouc; Macek Alfred, Pulgáry; Mílek Frant., Karlovy Vary; Patera Frant., Cheb; Procházká Jul., Rajhrad; Vadasová M., Olomouc; Váňa St., Hradec Králové; Vavrušová Anežka, Praha; Zdvihal Jan, Týnec n. Sáz. Z nejlepších překladatelů vybral los p. Alfreda Macka, jemuž jsme poslali knížku.

Poznámky ke 13. překladu

¹ trankviliĝo; ² iom post iom; ³ marŝas antaŭen, nikoli „antaŭiĝas“ = metas ion antaŭ io alia; ⁴ liberigas; ⁵ „starigita“, pak místo následujícího „starigi“ longtempan planon nutno dát jiné slovo, na př. „fari“, „kunmeti“. Nedali bychom „estis envicigita“ = zařazen; ⁶ antaŭmetis; ⁷ Centra komisiono por planado, Centra planada komisiono. Nikoli komisio = komise ve smyslu „pověření“; ⁸ prezidanto de la registaro, la ĉefministro, la registarestro; ⁹ ĝi celas... ŝanĝon; ¹⁰ konsisto; ¹¹ nikoli „keramiko“; ¹² maŝinfaka kaj metalurgia; precipe al tiu de maŝinfabrikado kaj al la metalindustrio entute; ¹³ antaŭsupozo; ¹⁴ transformiĝo; ¹⁵ en la direkto; ¹⁶ kuntuŝaj punktoj, kontaktpunktoj; ¹⁷ en konkordo, en akordo, principoj konformaj al; ¹⁸ staĉi místo „harmoniiĝan“, též agorditan.

Hm

Úkol 14.

Náš postup za války vyvolával na Západě dojem, jako bychom se připravovali přejít pojednou od své dřívější orientace kultury západní k orientaci t. zv. kultury východní. V tom smyslu jsem soudil a soudím, že prostě otázka byla a je dnes zase postavena zcela nesprávně. Nešlo a nejde ani dnes o změnu této orientace kulturní. Kulturní vývoj národa není hodnotou, která se vyměňuje jako kabát, a dokonce ne ze dne na den, nebo z jednoho roku na rok druhý a podle nějakého okamžitého politického režimu. Kulturní vývoj národa jsou staleté hodnoty, které celé věky se vytvářejí a nepomíjejí, stále se vyvíjejí a jen postupně a velmi pomalu se novým kulturním faktům a hodnotám přizpůsobují. Takový je sociologický vývoj každé národní kultury; v tom smyslu mluvit o změně naší národní kulturní orientace je prostě neznalost a nerozum. Ostatně v našem kulturním vývoji nikdy nepřestal platit jeden veliký fakt, který od vždy trval a trvá, t. j., že jsme vždy vědomě šli za tendencí všeobecnou a všelidskou, tedy nejen za vývojem a pokrokem západním, nýbrž také za pokrokem a vývojem východním... A tak pro nás problém, obsažený v otázce: Západ či Východ? je vědomě a jasně řešen odpovědí: Západ a Východ.

(Dr. Edv. Beneš: „Paměti“, str. 424—425).

Překlady pošlete do 25. ledna 1948. Nejlepšímu překladateli pošleme esperantskou knížku.

PRESEARARO-KONKURSO!

Sur paĝo 87 en la anonco „Komerca adresaro“ estas du preseraroj. — Bonvolu ilin trovi kaj anonci la ĝustajn vortojn al František Pytloun en Hradec Králové II, Zamenhofova 1010. — La tri gajnintoj ricevos senpage po unu kalendaro. (Ĝis 25. I. 1948.)

LOKAJ INFORMOJ

Boskovice. — Por faciligi sian rilaton kun la eksterlandaj gastoj dum la grandaj Sokol-festoj en Praha 1948, decidis 30 gimnastoj de loka Sokol-grupo lerni Esperanton. Kurson por ili gvidas Jan Tichoň, membro de Sokol. Imitinda!

Brno. — E-kurso en Ŝkola práce URO. Por ĝi varbis kelkdek anoncoj en ĵurnaloj, prizorgitaj ĉefe de ŜP kaj de nia klubo. Krome EK aperigis 400 tipografie efikajn afiŝojn, kiuj pendis en la urbo 14 tagojn. ŜP menciis E. en siaj afiŝoj, cirkuleroj kaj kartonaj reklamiloj. Malfermo 1. X., 32 p., instruas J. Vondroušek. — Ekspozicio de E. en Brno-Zidenice, filio de EK Brno, la 12. X. en komercejo de radiofirmao Stehlik. La ekspozicio estis instalita kun granda sperto, belgusto k. artisme, vekis grandan atenton kaj intereson; vizitis ĝin kelkcent homoj. Ĉefan meriton pri la bela sukceso havas s-anoj Sedlák, R. Nečas, Falta. Kurso sekvinta havas 33 partoprenantojn; instruas s-ino M. Jakubcová. — EK Brno aliĝis al la Asocio por UNO, filio Brno. — Funkcion de regiona peranto akceptis s-ro J. Friedrich, pro kio ni sincere ĝojas. — En kavalira salono de nova magistrata domo estis instalita ampleksa ekspozicio pri verko de Petr Bezruč. Sur la ĉefa muro estis pentritaj standardoj de nacioj, en kies lingvoj aperis tradukoj, do ankaŭ Esperanto-insigno kun surskribo. En vitrinjo oni povis vidi la Ĉeĥoslovakian antologion, verketon Bohemaj grenatoj, Sileziajn poemojn en traduko de Adamík, araban lernolibron, enhavantan poemon Minfosisto, hungaran libron kun alia traduko el Petr Bezruč. En la ekspozicia katalogo estis konstatite, ke Esperanto estas la tria lingvo, en kiu estas Bezruč plej ofte tradukata. La ekspozicio daŭris 5 semajnojn, vizitis ĝin kelkmiloj da homoj, ankaŭ EK Brno vizitis komune la ekspozicion. — La klubo sisteme dissendas la propagandilon „Krátké uvedení do esperanta“. Jus nun ĝi estis sendita al ĉiuj lernejoj de Brno, kaj rezulto: Venis letero de Alta sociala lernejo, en kiu estas esprimita simpatio al nia movado kaj invito al parolado pri E. Subskribita estas universitata profesoro rektoro Dro A. Blaha. — **Programo de kunvenoj:** 16. IX. Rememoro je prezidento Liberiginto T. G. M. 23. IX. Teorio pri relativeco (J. Kořínek). 30. IX. Fizionomio en la vivo (F. Čížek). 7. X. Bernard Shaw pri demokratio kaj parlamentismo (H. Slavík). 14. X. Doksy, somera restadejo esperantista (J. Vyhlička). 21. X. Pri kinematografio. Projekcio de filmoj (J. Pávek). 28. X. Solena vespero al la Tago de libereco. 4. XI. lom da fiziko (J. Vondroušek). 11. XI. Teatro en nia vivo (M. Adamcová). 18. XI. K. J. Erben en la ĉeĥa literaturo (N. Zitová). 25. XI. Teatra prezentado. Reĝisoras R. Nečas. 2. XII. Nikolo-vespero. 9. XII. Fauno de niaj arbaroj (T. Borkovec). 16. XII. Solena Zamenhof-vespero. 23. XII. Fabelo pri atom-energio; daŭrigo (F. Sýkora). 30. XII. Bulgara vespero. — (J. Vondroušek.)

Doksy. — Prelego de Dro A. Baur estis la 2-an de septembro en restoracio U jelena. Ĉeestis 86 p., kiuj tre atente aŭskultis rakontadon pri la hodiaŭa Svislando. Tradukadis s-o V. Špür. Post la prelego sekvis tri filmoj.

Hradec Králové. — Esperantista klubo aranĝas du kursojn: Unu en ŝtata gimnazio sub protekto de Ŝkola práce URO, aliĝis 32 personoj el ĉiuj klasoj, gvidas s-ano Mirko Hromas. Dua kurso okazas en direkto de fervojoj por oficistoj, aliĝis 12 personoj, gvidas Pytloun.

Hustopeče u Brna. — E-ekspozicio la 20—22-an de septembro en gimnazio, aranĝita de s-o A. Frolíšek kun subteno de la Distrikta Kleriga Konsilantaro. Vizitis ĝin are studentoj de la gimnazio kun siaj profesoroj. En la ekspozicio estis 150 kajeroj de diversaj Esperanto-gazetoj, 126 gvidfolioj, 180 libroj, korespondajoj el ĉiuj kvin kontinentoj, fotografaĵoj, afiŝoj ktp.

Cheb. — La 12-an de oktobro kunvenis unuan fojon esperantistoj kaj amikoj de Esperanto en la urbo. Prezidis Roman Bystřický, kiu bele klarigis la celon de nia ideo. 14 partoprenintoj unuanime decidis fondi lokan grupon de EAĈSR. Unuaj 16 aliĝiloj montras bonan komencon. (Fr. P.)

Chomutov. — Konstituiĝis Esperanta rondeto kun 25 membroj, lernantoj de kurso, gvidita de Gruntorád. Prez.

Fr. Gruntorád (Táboritská 10), sekretario R. Tůma (Škroupova 28), kasisto V. Varyš. Kurso kaj kunveno ĉiun merkredon kaj vendredon je la 19-a horo en Urba biblioteko. Gastoj el ĉirkaŭaĵo kaj el malproksimo bonvenaj. (G.)

Jaroměř. — La 22-an de novembro estis kunvokitaj esperantistoj de tiu loko, ankaŭ iamaj membroj de Esperantista klubo en Jaroměř. Kunvenis 28 p. kaj estis elektita la sekvanta provizora komitato: prez. JUDr. Karel Jakubec, sekret. Zdeněk Janků, kasist. Miloslava Jakubcová, protokol. Eva Marvánová, bibliotek. Vladislav Jakubec, reviz. MUDr. Zora Vocásková kaj Miloslav Vyšek. Komitatoj: J. Vacek, Dr. D. Vocásek, Z. Jakubec, Bursa. Post prizorgo de la necesaj formalaj okazos fonda ĝenerala kunveno.

Karlovy Vary. — Nia ŝatata dumsomera gastino s-nino Maria Persson el Malmö, Svedio, en sia letero per varmaj vortoj rememoras agrablajn tagojn, pasigitajn en nia urbo, nome en amika rondo de la samideanoj. Dum ŝia vizito en ĈSR ŝi pli detale trarigardis nian ĉefurbon Praha, vizitis Ĉeĥan paradizon, kie afable montris al ŝi la belecon de la rava ĉeĥa regiono s-ano fakinstruisto A. Bobek, admiris la ekspozicion de ĉeĥaj juveloj en Turnov kaj mondkonatajn okcidentbohemiajn banurbojn. Nune ŝi preparas en E-klubo en Malmö prelegon pri ŝia vizito en Ĉeĥoslovakio kaj ŝi promesas efike propagandi niajn vizitindajn lokojn. — S-ano Alois David, staciestro en Chodov, kun sia edzino, s-ano Dro František Vaněk el Nová Role, kaj s-ano Ján Mikloš el Čakanovce ĉe Košice ĝojigis nin kelkfoje per ŝia vizito en nia klubo kaj ni aldone envicigas ilin inter nomojn de samideanoj-gastoj, pri kiuj ni skribis en Lokaj informoj sur la pĝ. 97.

Košice. — Esperantistoj kunvenas regule ĉiun merkredon je la 19-a horo en Národní klub. A. Kremer gvidas kurson kun 15 p. Nova kurso estas preparata por januaro. (em)

Němčičky. — Kurso komencula dum februaro—majo, gvidita de Ant. Frolíšek el Horní Bojanovice, dufoje semajne, 15 p.

Nová Role. — La somera vizito de sveda s-ino Alamo tro bone sukcesis. La ĉeestantaro de ŝia prelego, ĉefe junaj ceramikistaj gelernantoj, entuziasme aplaudis la ĉarman parolantaron kaj ŝi farigis la unua eksterlanda honora membro de la loka grupo. Laŭstatute ŝi devis sin submeti antaŭe al severa lingva ekzameno, ŝi amuze ripetis la faman hispanan etiketon kaj ricevis rekompence bele ornamitan ĉeĥoslovakian vazon, kiu „multe plaĉis al ŝi“. — Nova kurso por ceramikista junularo komencis la 7-an de novembro kun 20 p. Gvidas Dro Vaněk. (F. V.)

Nové Město na Moravě. — En la kadro de kursoj de Distrikta Kleriga Konsilantaro gvidas profesoro Miloš Dokulil en novembro 10-lecionan E-kurson, vizitatan de 7 partoprenantoj.

Nový Bohumín. — Esperanto-monumento estis inaŭgurita la 5-an de oktobro de la loka E-klubo. Je la 10-a horo foriris procesie la esperantistoj kaj la gastoj el hotelo Avion al la monumento, kie parolis esperantistoj kaj reprezentanto de la urbo, sendita de la Loka Nacia Komitato. Tagmeze estis komuna tagmanĝo en hotelo Avion kaj posttagmeze je la 14-a horo en la sama hotelo programa kunesto, en kiu kantis ankaŭ samideano, membro de la Sofia opero, Nuni Nanev.

Olomouc. — Albin Neuzil instruas 30 lernantinojn de burĝa lernejo en strato Dvořákova.

Radio-stacio Ostrava invitis s-inon Julie Šupichová al kunlaboro, kiun ŝi akceptis. Okaze de 60-jara jubileo de Esperanto estis disaŭdigataj ŝiaj du prelegoj, unu en la regula programo, la dua en la ĉeĥa programo la 25-an de julio 1947.

Ostrava-Radvanice. — La 14-an kaj 15-an de septembro efektiviĝis ĝardenkulturantoj en Radvanice ekspozicion en burĝa lernejo. Ĉi-okaze aranĝis Jan Taraba belaspektan Espo-anguleton kun korespondajoj, gazetoj kaj libroj, kiu altiris atenton de vizitantoj. (ASt.)

Pacov. — Post informata parolado malfermis la 12-an de novembro Popola kleriga lernejo E-kurson por 37 p., gvi-

datan de distrikta peranto Jaroslav Koltán. La kurso okazas ĉiun merkredon dum du horoj en la burĝa lernejo knaba. La loka E-klubo esprimas dankon al la direktoro de la aranĝanta lernejo Jaroslav Vaškú, kiu ebligis aranĝon de tiu kurso. Propagando por la kurso estis farita per urba radiodisaŭdigo, per diapozitivoj en loka kinejo, per flugfolioj kaj per afiŝoj. En montraĵ fenestroj de J. Zoubek kaj de la Unua ĉeĥa asekurejo konstanta Esp-ekspozicio.

Plzeň. — Okcident-bohemiaj Esperantistoj kaj la „Kulturo“ aranĝis la 18-an de oktobro prelegon de s-o Inocent Gross pri la vojaĝo Svislandon kaj pri impresoj el la Berna kongreso. Li rakontis pri vojaĝo de ĉs. esperantistoj per aviono kaj tre interese li pentris siajn spertojn kaj impresojn pri la interkonatiĝa vespero, pri la art-vespero, la internacia balo, en kiu apud diversaj tualetoj pompis kolorriĉeco de naciaj kostumoj. Plue li parolis pri la urbo Bern, pri la svisa nacia festotago, pri ekskurso al Jungfraŭ. La prelego, parolata ĉeflingve, altiris vastan publikon neesperantistan, tial ĝi estas tre bona propaganda faro. — Kurso de „Kulturo“ komencis en oktobro, instruas s-o Láďa Svoboda kaj s-o Jos. Patera 48 kursanojn. — La popola kleriga Hus-altlernejo komencis kurson la 4-an de novembro. Instruas In. Gross.

Podmokly. — La nombro de kursanoj altiĝis al 25.

Praha. — EK aranĝis la 13-an de decembro sian tradicion „Nikolaan vesperon“ en restoracio „Aeroklub“, Praha II, Smečky 22. Ĝi estis bela amuza kunesto de gesamideanoj kaj multaj gastoj-neesperantistoj kun ĝaja varia programo, danco, nikolaŭ sceno kaj donacoj. La programon prizorgis plejparte la „Junularo“ (E. Nývltová, V. Zvědelíková, St. Boucká, M. Nývlt, J. Forman). La Esperantan Nikolaon prezentis s-o Jan Valeš, oratoris Ant. Slanina kaj M. Nývlt. Partoprenis ĉ. 150 personoj. — Dum la vespero okazis samtempe ankaŭ kunveno de „Doksanjoj“ (partoprenintoj de Somera Esperanto-lernejo en Doksy), kiuj uzis la okazon por ĝojiga renkonto. — Tro rapide alproksimiĝis la fermhoro je la 1-a nokte kaj nia familia rondo nur malfacile adiaŭis. (Sv)

Prešov. — Loka grupo de SES fondita la 20-an de septembro. Prezidanto Andrej Beisetzler, revidento de ČSD, sekretario Ondrej Sninčák, profesoro.

Přerov. — 18 lernantojn de burĝa lernejo instruas s-ino Kavková.

Šternberk. — La 15-an de junio vizito de esperantistoj el Olomouc. Gvidate de A. Harna kaj M. Jurič el Hradečná ili iris grupe kun E-flagoj en la urbon. Tie estis disdonitaj atestoj al tiuj, kiuj finis la E-kurson, gviditan de Harna en Supera popola lernejo. La 11-an de septembro Loka Kleriga Konsilantaro komune kun Esperantista rondeto en Šternberk aranĝis publikan paroladon de Vlastimil Blažek el Olomouc pri la 32-a Universala Kongreso de Esperanto kaj pri Svislando.

Tábor. — Ekspoziciaj fenestroj parolas: Fondinto de nia klubo kaj ĝia sekretario s-o Škorpil aranĝis en konsento kun la direktoro de Agronomia monpruntejo s-o Voborský en ties du elmontraĵ fenestroj sur la Roosevelt-placo belan ekspozicion de esperantaĵoj: libroj, ilustritaj poŝtkartoj, leteroj, flugfolioj, prospektaj, afiŝo „60 jarojn de Esperanto“, interesaj sendaĵoj de malproksimaj landoj, ekzemple kokoso en origina pakaĵo, atestas pri esperanta viveco. Multaj konvinkaj devizoj ornamas la internon de la ŝrankoj kaj vokas de la vitraj tabuloj en la ŝaŭmanta amason de la preterirantoj: Lerne Esperanton, ĝi estas utila! Duan ekspozician fenestron de Esperantaĵoj instalis Jana Živnová, studentino de gimnazio, en sia gepatra domo sur Žižka-placo. Ankaŭ tie estas konvinkaj propagandaj surskriboj arte ellaboritaj de s-o Melich. Trian ekspozicion iniciatis kaj efektiviĝis s-o Škorpil en du fenestregoj de la Agrikultura banko sur la ĉefstrato de la urbo. Materialon liveris nia aranĝo de la Letervespero. Alvenis 48 ilustritaj pruvoj el la plej diversaj landoj de la mondo kaj rakontas klare, ke Esperanto vivas ĉie, ne nur en Tábor, ke ĝi estas efektive tutmonda movado. — Gimnaziano Vladimír Havlíček publikigis en la loka gazeto Jiskra (Fajrero) tradukon de letero de sia aŭstralia korespondanto. Precipe aludo pri nia nacio kaj ŝtato en tiu-ĉi letero, kies originalo estas en la redakcejo al la dispono de la publiko, vekis intereson kaj montras util-

econ de persona kontakto kun alinacianoj. Iam tamen dissaltos la obstinaj baroj! — S-o ing. Krajc gvidas kurson por 20 komencantoj por ŬRO kaj s-o ing. Šbáňelec ankaŭ komencan kurson en la komerca akademio. Skoltingojn instruas s-inoj JUC Komzáková kaj Eva Koutniková, sekretariino de la komerca akademio. — Niaj regulaj kunvenoj estas en unuaranga hotelo Znamenáček, sur kies reprezenta domo lasis la ĉefo s-o Michálek fiksi elegantan vitran tabulon kun la surskribo: ESPERANTO MARDE JE LA 19a EN LA KLUBEJO. Diversmanieran programon prizorgas ĉiam la societa amuza komitato de s-ino Pastrňáková, edzino de kuracisto, Droj Rajlich kaj Preclik. Ofte prelegas ŝtata prokuroro Dro Dvořák. Plej memorinda vespero estis, kiam ĉe ni havis paroladon episkopo de la ĉeĥoslovaka eklezio s-o Dro Miroslav Novák pri la temo „Kristanismo kaj la interna ideo de Esperanto“. Ekskurson faris niaj klubanoj en la atelieron de pentristo s-o Knotek kaj admiris same liajn artiste laboritajn agordajn bildojn el la ĉirkaŭaĵo de Tábor, kiel ankaŭ lian konforman vortan akompanon de la bildoj en agrabla Esperanto. — Por faka banka revuo verkis du trafajn artikolojn anstataŭante de la estro de la Nacia banko en Tábor s-o Dro Kolářik. La unua estis titolita „Per Esperanto al internacia interkompreniĝo“, la dua „Esperanto, la elirejo de la barbara Babelo“. La artikoloj estas superrigardo de la historio de l'artefaritaj lingvaj projektoj, montras valoron de Esperanto kaj ĝian disvastiĝon. S-o Škorpil verkis vervan artikolon por „Industria pioniro“, aperanta en Zlín (Průmyslový průkopník), titolitan „Ĉu vi volas ekoni la mondon?“ En la monatan revuon Kraj kalicha (Regiono de l'kaliko) skribis informan artikolon Dr Jokl. La semajnaj kaj tagaj Taboraj gazetoj publikigis ĉiam tre kompleze ĉiun noton pri novaĵoj el nia movado. — Preparigas turista bilda prospekto pri historia urbo Tábor, urbo de Hus kaj Žižka. Bonvolu jam nun postuli la gvidfolion pri nia urbo ĉe la estro de la Loka Nacia Komitato (MNV) s-o Francisko Sivera, Tábor. — (Dr. Jokl.)

Trebišov. — Loka grupo de SES fondita, ĉeestis 30 p., prezidanto Tibor Mihalič, sekretario R. Stibar.

Úpice. — La 7-an de julio parolis s-ino Alamo nur al 100 aŭskultantoj, ĉar samtempe okazis alia aranĝo. Post la parolado partoprenis s-ino Alamo dancamuzon de la Sokola laborgrupo. — Depost 10-a de oktobro daŭras E-kurso de la Laborsindikatoj ŬRO por 10 p., en la komenco estis 44 p.



Redakce a administrace sděluje:

Vydáváme toto číslo s urychlením, aby naši čtenáři měli druhý ročník úplný koncem roku.

Mnoho materiálu jsme odložili do č. 1. (zprávu o pracovní schůzi v Praze, o krajské konferenci v Olomouci, další stránky slovníku a j.).

Číslo 1. vyjde co nejdříve během ledna. Abychom mohli stanovit náklad, prosíme, abyste laskavě použili přílohou složenku k zaslání členského příspěvku na rok 1948 — pokud jste tak již neučinili nebo pokud platíte prostřednictvím svého klubu — v částce Kčs 70.—. Zajistíte si tak nerušené zaslání časopisu.

Abychom dále mohli stanovit definitivní náklad slovníkové přílohy, nutně potřebujeme, aby ti, kteří si ji přejí, oznámili nám to zasláním příplatku Kčs 15.—.

Mlčky trpěné zaslání přílohy nemůžeme považovat za přihlášku. Slovník bude přikládán podle možnosti tiskárny i o více stranách než šestnácti, takže vyjde co nejdříve.

Vydavatelství Svazu

Podle usnesení pracovní schůze v Praze dne 30. listopadu 1947 bude otázka vydání velkého slovníku česko-esperantského dále sledována. Do doby, než bude možno tento slovník vydat, bylo usneseno vydávat překlady z české literatury. Podíly dosud zasláné budou převedeny Vydavatelstvímu Fondu za předpokládaného souhlasu upisovatelů. Těm, kteří by snad nesouhlasili, budou jejich podíly vráceny. Ostatní podíly budou považovány za půjčku, která má umožnit, aby bylo vyhověno všeobecnému volání po pěkných esperantských překladech z české literatury.

INFORMOJ

Alvoko, represinda en ĉiuj esperanto-gazetoj:

Subskriboj sur deklaroj por Esperanto al Organizo de Unuigintaj nacioj multigas tre malmultenombre kaj malrapide, ĉar samideanoj malatentas sian plej proksiman ĉirkaŭaĵon. Oni atentigu ilin, ke ili zorgu pri tio, ke la deklaron subskribu: ĉiu plenkreska membro de la propra familio, ĉiu parenco, amiko, konato, ĉiu profesia kunlaboranto (en oficejo, laborejo ktp.), ĉiu kunmembro de neesperantista societo aŭ movado, kies ano oni estas, ktp. — Tio estas facile atingebla, speciale, se oni antaŭe havigas aŭ montras al subskribontoj informan kaj propagandan materialon. (ou)

Komunista frakcio en SAT (Marks-Lenin-Stalinisma) denove funkcias. Celoj: a) Propagandi Esperanton ĉe la komunistoj, b) Propagandi komunismon ĉe la esperantistoj, c) Arigi la tutmondan komunisteman esperantistaron. — Povas aliĝi ĉiuj komunistemaj esperantistoj, anoj de SAT aŭ de iu nacia Esperanto-asocio. La jarkotizo estas libervola. Aparta abono al la frakcia bulteno „Raci' nin vokas“ kostas 1 dolaron jare. La frakcia bulteno aperos dumonate ekde januaro 1948. — Por aliĝoj kaj informoj turnu vin al Komunistema frakcio en SAT k-do Elis Johansson, Bergsbogatan 20, Borås (Svedio) aŭ J. Pelcman en Plzeň.

Kotizo al Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) estas por jaro 1948 fiksita je 40 Kčs. Membro de supre nomita asocio ricevos senpage la monatan gazeton SENNACIULO rekte de Roterdama eldonejo. La mono estu sendata al la landa SAT-peranto k-do Josefo Patera, Plzeň, Dvořákova 24. Uzu poŝtpagilon: Josef Patera, n-o 87857. — K-do, loĝantaj en Slovakio, Silezio aŭ okcidenta kaj norda limregiono, turnu sin ĉiam al la SAT-perantoj: por Slovakio: k-do Kollman, Bratislava, Dunajská 84; por Silezio: k-do Raška, Klímkovice, Slezsko; por la limregiono: k-do Eliáš, Kundratice, okres Chomutov.

Literatura Mondo, beletra revuo, pri kiu ni rajte povas fieri, aperis regule dum 1947. Estas nia devo ĝin daŭre subteni, ĉar sen ĝi ne estas pensebla nia literaturo. Kunlaboras niaj unuaj verkistoj kaj poetoj. — Sendu abonon 150 Kčs al la Librovendejo de EACSR (přsp. konto 12.371).

Nian himnon „La Espero“ (tekston kaj muzikotojn) sur poŝtkarta formato eldonis Esperantista societo en Olomouc. Prezo: 1 ekz. Kčs 4.—, 10 ekz. Kčs 15.—. Mendo ĉe la nomita societo sendante samtempe pagon en poŝtmarkoj.

Rev. Naynasatta el Ceylono petas siajn korespondantojn, ke ili senkulpiĝu lin pro lia longa silento. Li estis 18 monatojn grave malsana kaj dufoje operaciita. Resaniĝante li promesas baldaŭ respondi al ĉiuj siaj korespondantoj.

Publikan dankon meritas sinjoro Tomáš Machala el Pržno apud Jablunka por konstanta subteno de nia klopodo esperantigi la skoltan junularon, ĉar li, terkulturisto, trovas ĉe sia elĉerpanta laboro tempon por la propagando de nia kara lingvo. Sekvu la ekzemplon! — Esperanto-fako de Junák.



„O novy mezinárodní jazyk“. Otiskujeme zprávu pod tímto titulem ze Svobodných novin z 25. XI. 1947, aby bylo zaznamenáno pro nás a pro naše čtenáře, co IALA slibuje, a aby bylo lze, řekněme po roce, posouditi, co z toho splnila:

„Úsilí o vytvoření mezinárodního jazyka je stále živé a newyorská International Auxiliary Language Association (IALA), jejímž předsedou je pařížský profesor Martinet, vypracovala návrhy na tři typy nového mezinárodního jazyka, z nichž dá za pomoci svých spolupracovníků po celém světě stanovit nejvhodnější typ. Všechny navržené typy se opírají o latinu jakožto základ, takže jsou výhodné pro románské národy a částečně i pro Anglosasy, ale ze slovanského slovního pokladu, v němž by se dalo najít dosti vhodných slov, neobsahují navržené typy nic. V těchto dnech se obrátila IALA také na pražského universitního profesora dr. B. Trnku s žádostí, aby jí poslal pět set adres zástupců nejrůznějších

povolání a společenských vrstev z Československa, na které se pak IALA obrátí s dotazem, pro který ze tří návrhů, jež jim zašle, se rozhodnou. Dotázání dostanou brožuru s náčrtý navržených tří typů nového mezinárodního jazyka a společnost IALA bude pak propagovat typ, který soustředí na celém světě nejvíce hlasů.“

My k tomu zatím poznamenáváme toto: International Auxiliary Language Association je soukromé sdružení, ani ne spolek tak dobře organizovaný jako na př. náš svaz. Ani zdání o jakékoli autoritativnosti, ať pramenící z moci veřejnoprávní nebo z úcty k odbornictví. Jejich General report 1945 je brožurka 64 stran, obsahující obecně známou argumentaci o potřebě mezinárodního jazyka a o typech umělých jazyků, jak tuto teorii esperantistické zpopularisovali.

O problému hlavním, jak totiž docílit, aby umělý jazyk byl obecněji rozšířen, není tu ani slova. Tu je stále teorie esperantistů jediná: nabízetí jazyk hotový, rozšířený, vyzkoušený v umění slovesném i v praktickém upotřebení a snažit se, aby jeho rozšíření rostlo právě jen přirozeným výběrem stoupenců. Dosavadní zkušenost ukázala, že je to možné. Snahy samozvaných odborníků, za něž se vydávají iniciátoři IALA, ovšem škodí šíření se myšlenky mezinárodního jazyka. Ale nemohou ji zničit.

Jistě poškozují hnutí pro mezinárodní jazyk dopisy, jež rozesílá skupinka nadšenců, kterým se zdá pronikání esperanta do veřejného života příliš pomalé a myslí, že problém rozřeší, navádějící dobroseďné lidi k stranickeému informování rozhlasu. Dopis zní:

„Náš rozhlas má podivnou ctižádost: stanice Praha se chce stát „Verda stacio“. Chce propagovat zaostalé esperanto. Náš rozhlas si není vědom toho, že ten kdo ještě dnes propaguje esperanto, podporuje konservativní a reakční živel v otázce mezinárodního jazyka. Náš rozhlas si nedal ani tolik práce, aby porovnal esperanto s occidentalem, a rozhodl se pro ten jazyk, který odpovídá vědeckým požadavkům, kladeným na pomocný mezinárodní jazyk. Esperanto nemá vědecký základ. Esperanto není mezinárodní jazyk, protože neuvádí mezinárodních slov. „Bonan tagon“, to je makaronština. „Tago“ není mezinárodní slovo. Každý prostředně vzdělaný člověk zná slovo diár - diarium a z něho vyplývá slovo die: „Bon die“. Není to lepší? Ale snad esperantisté mají na mysli „tágo“ od biliáru — pak ovšem se s nimi nemůžeme dorozumět. A tento „jazyk“, který si říká „mezinárodní“, propaguje náš rozhlas! Přátelé, pište rozhlasu! Upozorňujte na pravý stav věci! Informujte náš rozhlas o tom, co je esperanto a co je occidental. Poznamenejte však, že Váš dopis není určen do rukou esperantisty, který v rozhlase vede esperantské zprávy, nýbrž do rukou šéfa rozhlasu.“

Československý rozhlas skutečně nepropaguje esperanto. On prostě esperanta používá pro informaci ciziny. A ať je teorie o mezinárodním jazyku jakákoli, je jisto, že esperantská vysílání jsou poslouchána nejvíce ze všech cizojazyčných vysílání. Rozhlas ani esperantské organizace nemohou na to mít vlivu. Prostě lidé rozumějí esperantu a poslouchají zprávy v něm. Také proto, že esperanto vyniká pro své fonetické vlastnosti srozumitelností při poslechu. Potvrzení z 30 zemí jsou toho dokladem. A je skutečně bez významu pro srozumitelnost a naučitelnost esperanta, říká-li se tago a ne die, jak si pan E. Wahl usmyslil. Diarium není slovo příliš mezinárodní, esperantisté provedli už daleko přesnější rozbor mezinárodnosti slov, než byl původní impresionismus Couturatův a ještě méně Wahlův. — Milosrdně neche me stranou denunciační tón dopisu. Esperantští hlasatelé rozhlasu nehodlají mítí tajnosti před šéfy, v něž vkládá pan autor dopisu své divné naděje.

K tomuto číslu jsou přiloženy složenky. Raďte jich použití k vyrovnání svazového příspěvku (Kčs 70.—, ročnímu příslušníci bez časopisu Kčs 20.—). Lze jimi též platiti příspěvky UEA (Kčs 125.— MA nebo Kčs 50.— M3). Slovníková příloha nemohla být k tomuto číslu přiložena, bude až v čísle lednovém. Kdo si nepřeje její zasílání, necht nám vrátí dosud vydané listy. Ostatní, pokud tak dosud neudělili, pošlete doplatek Kčs 15.—, jež lze poslati zároveň s příspěvkem.

NIAJ AKCEPTEJOJ (kvara listo)

ps = persone tlf = telefone

Bystřice p. Host.

S-ro E. Hrabal, fervojinspektoro kaj staciestro, ĉiutage, ps.

S-ino Valja Flašarová, kuracistedzino, urbo-placo, ps. 14—18.

S-ro Th. R. Čejka, eksinstruisto, »Lázně«, ĉiutage, ps.

Chvalčova Lhota (pošto Bystřice p. Host.).

S-ino D. Čejková, »Podlesi« 188, ĉiutage, ps.

Liberec.

L. Blecha, ČSD zásobárna, tlf. 5041/527.

R. David, tiskárna-presejo Cíl, tlf 3535.

Ing. Fanta, ČSD dopravní úřad (ložejo Na Bojišti 14, tlf 5041/350.

R. Hanzlík, vitrajisto, Na rybníčku, tlf 4867.

S. Knížek, direktoro de la burĝa lernejo IV., Na čtvrti.

Ota Madr, řídící učitel, popola lernejo, Janův důl, tlf 3262.

J. Novák, ĉefkelnero en grandhotelo Zlatý lev.

T. B. Novotný, komercejo, Pražská 3, tlf 3706.

Toman, laborejo OP, Str. Pražská.

A. Kíša, Svaz přátel SSSR, Gotvaldovo nám.

Ostrava-Zábřeh.

S-ro Alois Kubala, str. Rodinná 43.

S-ro Alois Schindler, str. Zengrova 125.

S-ro Jindřich Jakeš, str. Rodinná 21.

S-ro Targosz, str. Bezkydská 25, tlf 851-29.

S-ro Stratil, str. Březínova 69.

S-ro Hlavatý, str. Česká 7.

S-ro Vurst, str. Rodinná 28.

S-ro František Vosnák, str. Alexandrova 7.

S-ro František Eliáš, str. Chalupníková 8, tlf 850-16.

Ostrava I.

S-o Hinčica, str. Kounicova 16.

Ostrava-Hrabůvka.

S-ro Jos. Weiss, str. Místecká 158, tlf 811-29.

S-ro František Petřík, str. Letecká 14.

Podmokly.

S-ro Arnošt Chmel, Revoluční náměstí n-ro 3, 15—20 horo.

S-ro Václav Růžička, I, Nové Železnice, Kozinova 1256/10, tuttage.

Úpice.

S-ino Marie Bartovská, ps. vespere kaj sabate kaj dimanĉe tuttage en str. Nejedlého 436, tlf labortage n-ro 3.

KORESPONDI KUN ĈS. SAMIDEANOJ DEZIRAS

Kontakto kun Finnlando. Kiu deziras korespondi kun esperantistoj el bela Finnlando, lando de mil lagoj, anoncu aĝon, profesion kaj temon, pri kiu li deziras korespondi, al Esperanto-Instituto de Finnlando, Helsinki, Töölöntulinkatu 7. Via adreso estos registrita kaj konvena korespondanto serĉata.

Julio Csapó, **Satu Mare**, Str. Kanissi 70, Rumanio, Transsilvanio, vicdelegito de UEA, oficisto de ligno-komercio kaj gvidanto (presbitero) en la kalvinista eklezio, serĉas kunlaboron kun eksterlandaj kristanaj-protestantaj gazetoj kaj societoj.

Lloyd J. Byars 2210 Lamburne Ave Salt Lake City G, Utah USA, 38-jara, edziĝinta, radiotekn.

Ivan D. Anton, oficisto, **Glavaci-Vračansko**, Bulgario.

Georg Petz, oficisto, nask. 1909, Radegunderstr. 26, **Graz, Andritz**, Aŭstrio.

Jorge Antonio Medeiros, **Nova Lisboa**, Angola, Afriko. Norath J. C. Foster, Aboriginal Station, **Walgett**, N. S. W., Aŭstralio.

Huberto Egipto de Gergueira, Rua Pires do Rio 289, (**Mooça**) **Zuiz de Fora**, Brazilo.

Georgi Hristov Marinski, **Kalen**, Vratsansko, Bulgario. Patai Peter, Korpona 50, **Pestszentlorinc**, Hungario.

F. Matz, **Spro**, Norvegio.

Graf Henri, Rømmemoos 189, **Littau/Lu**, Svislando.

Anatol Syromjatnikov, Vosstania str. d. 53, kv. 25, **Leningrad** 14, USSR.


J. I. Aksel, Petrogradstorona, Blochina str. 2/77, kv. 21, **Leningrad**, USSR.

Axel Hattens, Gudmandsen, Dannebrogsgade 52, A. Sv., **Kobenhavn V.**, Danlando.

M. Busquet, 31 rue de Beauvais, **Amiens** (Somme), Francio.

Van den Briele, 18 rue Verte, **Boezinge** (les Ypres), Flandre Occidentale, Belgio.

Piet Cley, Lingestraat 16 B, **Groningen**, Nederlando.



Ĉu vi jam uzas novan kaj tre praktikan
Esperanto-notblokon?

Se ne, mendu ĝin senprokraste! Malsarĝu vian cerbon per aferoj, kiujn bone memorigos al vi patentita Esperanto-notbloko, kies folioj estas ŝanĝeblaj.

Esperanto-notbloko estas ĉiam preta servi al vi.

Esperanto-notbloko kostas Kčs 50.—.
Afrankon mi kalkulas aparte.

Fabrikas kaj liveras firmo
Jan Tichoň, faka librobindisto *Bojkovice*

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů CSR v Praze XIX, Uralské nám. 9. Odpovědný zástupce listu dr. Stan. Kamarýt. Ročně 70 Kčs., s členstvím. Bez členství 60 Kčs. Účet pošt. spoř. 9.602. Tiskne »Cik« v Karl. Varech. Účast na poštovní novinové službě povolena řed. pošt v Plzni č. j. I-Dob-2372-OB ze dne 13. III. 1947. Dohledací poštovní úřad Karlovy Vary 1.

En la fino de la dua jarkolekto

Ni finas ĝin kun multe pli bona humoro ol la pasintan. La stato de la movado dum la jaro 1947 videble plifirmiĝis. La nestabilaj elementoj, kiuj antaŭ la milito svarmetis ĉirkaŭ niaj organizaĵoj, forfalis kaj ne revenas. Sed la eroj de la movado, kiuj estis apogiloj de ĝia organizo, restis kaj firmiĝis. Homoj, kiuj rigardas sia morala devo resti en la movado kaj helpi al enpenetro de Esperanto en pli vastajn sferojn de idearo samtempa, multiĝas kaj ne forlasas nin jam. Multiĝas homoj, kiuj ne atendas de esperantismo miraklon, sed kiuj estas konvinkitaj, ke ĝia pli vasta disvastiĝo signifas plibonigon de farto de homoj laŭ tre diversaj aspektoj. Legante esperantistan gazetaron ni povas konstati tiun ĉi staton en la tuta mondo. Precipe edificanta estas foliumado en Internacia kulturo, kiu dokumentas ekfloron de nia movado en socialismaj ŝtatoj slavaj, kaj en Literatura mondo, kiu dokumentas daŭre pliboniĝantan kvaliton de nia lingvo.

Por nia lando la plej ĝojiga fakto estas kresko de nia nombro. Ni finas tiun ĉi jarkolekton kun 1700 membroj kaj abonantoj. Kvankam ĝi estas nombro modesta, ĝi ĝis nun neniam estis atingita de esperantista gazeto en nia lando. Kaj krom ni aperas ankoraŭ tre plaĉa Esperantisto slovaka. Tiuj du faktoj mem dokumentas, kiom nia movado diskreskas.

Sed ankoraŭ pli ĝojinda fakto estas, ke alvenas kunlaborantoj al nia redakcio. En la unua jarkolekto devis esti preskaŭ ĉiuj ĉef-artikoloj verkitaj de la redaktoro mem, en tiu ĉi jarkolekto sole unusola. Kroniko enlanda kaj Lokaj informoj dokumentas jam pro sia amplekso la kreskantan vivantecon de la movado. La sendataj versoj vidigas en ne unu kazo tiom fundan konon de la lingvo, ke estiĝas poemoj, se enestas en la koro poezia kordo.

Pro tiuj ĉi konstatoj akceptu dankon ĉiuj legantoj kaj ĉiuj kunlaborantoj, komencante de tradukantoj de la Lingvaj taskoj kaj raportantoj por Lokaj informoj kaj finante kun aŭtoroj de artikoloj. Kaj ni iru en la novan jaron kun firma espero, ke ankaŭ dum ĝi ni ne laboros vane.